

Espero

Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

(Honorata per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906)

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIBLIOGRAFIO. — ŜAKOJ

«Unum ovile et unus pastor.» (Joh. X, 16.) «Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta.»

ARTIKOLARO

Eklezio kaj scienco. — Monsinjoro MIGNOT.	225
La Fortspirituloj. — LA BRUYÈRE; trad. R. BADERT.	229
La nomo de l' besto. — Paŭlo THIERRY	229
Kelkaj floroj socialaj. — HOLLANDANO	231
Evangeliaj meditoj por nuna tempo. — Em. PELTIER	238
Internaciismo kaj Pacifismo. — J. DURoux; trad. ANY-BOURE	239
Vivo de l' Katolikismo.	244
Atentu	245
Propaganda Kroniko. — L. MILHO.	246
Katolik-Esperantistaj Societoj	248
Katolikaj kunvenoj en Dresden.	251
Letero de P-o Richardson.	251
Gazetoj naciaj katolikaj. — C. DE LA ROCHE	252
Esperanta Bibliografio.	254
Ŝakoj. — AL. WAGNER kaj J. ELLIS	256

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ce la Direktoro : P-o Em. PELTIER
Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Por la FRANCAJ poŝtmandatoj la Poŝtoŝicejo estas SAINTE-RADEGONDE ; por la NEFRANCAJ la poŝtoŝicejo estas TOURS.

'Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

ABONEJOJ DE E. K.

- FRANCLANDO : 'Ce la Direktoro de E. K. — 'Ce la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, *Paris-V.* — 'Ce librejo Warnier kaj Ko, 15, rue Montmartre, *Paris.*
- ANGLOLANDO British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand, *London, W. C.*
- BOHEMUJO-AUSTRIO : F. Topič, libr. Ferdinandova, 9, *Praha.*
- CILILANDO ; S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, *Santiago-Chili.*
- DANUJO Dana Esperanta Oficejo, S-o Monster, 54, B. 4. Osterbrood, *Kopenhago.*
- GERMANLANDO : Moller & Borel, 96, Prinzenstr., *Berlin.*
- HISPANLANDO : S-o A. Jimenez-Loira, Paterna, *Valencia.*
- HOLANDUJO : S-o H. B. van ZWET, Heerenweg, 51 bis, *Utrecht.*
- HUNGARLANDO : S-o Endra Varju IV, Kigyo, U, 62. em. 14, *Budapesto.*
- ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, *Fontanafredda de Pordenone (Udine).*
- LITOVUJO : P-o A. Dombrowski, en *Kovno, Rusujo.*
- NOVA ZELANDO : S-o A. J. Burges, libr. Devon Street, *New Plymouth (New Zealand).*
- POLUJO : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, *Warszawia.*
- PORTUGALUJO : D-o Malato, 37, Clerigos, *Portalegre.*
- RUSLANDO : Societo Espero, Bol. Podjaceskaja, 24, log. 19. *S. Peterburgo.*
- SVISLANDO : Librejo Garin, 20, rue Corratierie, *Genevo.*
-

KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : 5 fr. (2 Sm.). — En Francl. 4 fr. (1 Sm. 60).
Unu numero : 0 fr. 50, afrankite, (20 Sd.)

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj : oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Poŝt-kuponoj internaciaj estas akceptataj.

ATENTU! Sur la koverto de l' unua numero post la fino de l' abono estos stampata : Via abono finiĝis kun la lasta n-o.

REKLAMOJ.— Ni ricevas grandajn anoncojn nur por UNU JARO (10 n-oj) Tuta paĝo kostos 100 frankojn; — 2-on-paĝo : 50 fr.; — 4-on-paĝo : 25 fr.; — 8-on-paĝo : 15 fr.; — 16-on-paĝo : 8 fr. — Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 15, rue Montmartre, aŭ al la Direktoro de E. K.

Ĉiu abonanto havas rajton por 5-linia anonceto dum tuta jaro de l' abono.

KATOLIKA PREGARO

EN KIU TROVIĜAS 'CIUJ DIMANĈAJ DISERVOJ

KAJ

LA PLIMULTO DE LA FESTOJ DE L' JARO

Latine kaj Esperante

APROBITA DE LIA ALTA MOŝTO M-o RENOUE

'Cefepiskopo de Tours (France)

1-a volumo.—Prezo : 2 fr. 50 (1 Sm.) : bindita : 3 fr. 10 (1 Sm. 20)

ANONCETOJ

5 linioj senpage por abonantoj dum tuta jaro de l' abono. — Oni devos pagi 10 centimojn por ĉiu vorto post 5 linioj, aŭ mallongigi l' anonceton.

Sola kondiĉo antaŭa pago de l' abono.

— KOMERCO —

Vinoj ruĝaj, blankaj, junaj k. maljunaj nepre naturaj, bonegaj, altgradaj (11° almenaŭ), senditaj senpere de bienuloj el Roussillon. Skribu al parokestro Andreu, en Fourques (P.-Or.), France. Petu prez. 8

Esperantaj romanoj tre bone presitaj, verkitaj de S-o Louis Rigoir, 26, rue du Progrès, Marseille, Franc. *En songo*, parol. de Do Zamenhof: 0 fr. 75. *Kristnasko*, par. de Do Philippett: 1 fr. 50. *Kanto de l' Diabolo*, parol. de Aymonnier, 1, 50. 6-5

Presmaŝinoj kaj materialo por presejoj. Instalado de presejoj: tre rapidaj presmaŝinoj presantaj unu flankon de l' papero; brak-presiloj; tranĉo-maŝinoj por papero, kc. — A. Dubuc, mekanikisto-konstruisto, 15-17, rue Saint-Romain, Paris, Telefono 706-45. 11-5

Stradivarius, violono de 1690, vendebla ĉe Monakinoj, Casa di Ritiro, Zitelle Udine, Ital. 7

Tandem'o estas vendebla aŭ interŝanĝebla kontraŭ fraŭlina biciklo ĉe L. Polart, 44, rue Mozart, Paris, Franc., kiu ricevos ĉiam plezurege k. respondos leterojn pri socialaj demandoj. 18

Bonega oleo Toskan-oliva, prezoj konvenaj. Sin turni al S-o Luciano Graziani, Fontanafredda de Pordenone, Udine; Itall. 20

So J. Pion, 34, rue de la Comédie, Beaune (Côte-d'Or), Franc., sendas 12 malsimilajn vidaĵojn esperantajn pri Beaune, po 1 fr. 50 (60 Sd.). Li akceptas korespondon per steno-grafio Esperanta laŭ Pitman. 21

S-no Eva Jouan, Palais Belle-Ile en Mer (Morbihan), Franc. Artobjektoj faritaj de markreskaĵoj sur fajenco, ŝtofoj, papero. Laboro neriproĉinda kaj malkara. 25

Grani-Zanon, kunmetitaj laktoipofosfitoj: kuracilo la plej taŭga, serioza, ekonomia, honesta, populara k. sukcesplena kontraŭ anemio k. malforteco. Boteleto da 100 pilol. 2 fr.; 6 botelet. 10 fr. Eksterl. la poŝtelspezoj plie. Sin turni al So G. Zanon, Villadelconte, Padova-Itall. 26

Libroj vendotaj. Tri unuaj jaroj de *Lectures pour Tous*, netroveblaj en librejo. Ĉiu jaro formas beleg. volumon 1152-paĝ. in-4, en perfekta konservateco. Skribu al So Bourgery, 23, rue du Nouv.-Calvaire, Tours, Franc. 27

Fama ruĝa vino de Mercurey en boteloj k. bareloj. Campanigo de vinoj por bienuloj, laŭ prezo interkonsentota. Ch. Jadeau, en Mercurey (S.-et-O.), Franc. 27

— KOLEKTISTOJ —

S-o Derroite, 108, avenue Victor-Hugo, Paris. Kolektas poŝtkart. de religiaj pentraĵoj, sed nur: 1-e per paketo po 12 aŭ 24; 2-e post anonco k. akcepto de l' nombro k. prezo; 3-e el muzeoj de l' urbaj de l' sendantoj; 4-e pri vivo publika de J.-K. 1-5

F-no Barbin, Le Lion-d'Angers (M.-et-L.). Serĉadas, interŝanĝas, aĉetās antikvajn paperojn, leterojn de 17, 18, 19-aj jarcentoj. Kolektadas ankaŭ famajn aŭtografojn precipe de muzikverkistoj. 2-5

S-o Al. Wagner, Stanislau, 2, Aŭstrujo, s.k. 1.36, deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmark. nur kun komencantaj gefilatelitoj laŭ senf. 1908. Sendu anticipatajn kondiĉojn. 12-5

Frato Mucien Louis, prof., rue du Collège, 136, Verviers, Belg. estus tre feliĉa ricevi de afablaj samideanoj: divers. propagandilojn, malnovajn revu-numerojn k. ĉiuspecajn aĵojn rilatajn al Esperanta disvastiĝo. 15

S-o Varju Endre, Budapest, 1V, Kygio, C-E 62, em, 14, kolektas kaj interŝanĝas uzitajn poŝtm. 17

Rusl. Saratov, Kesto 12. G. Davidov pagas altan prezon por gazetoj «*Esperanto-Santander*», Saksa Esp. n-o 2, 1907, Japana Esp. n-o 3 1906 La Pioniro-India, n-oj 1, 2, 4. La Esp. Sofia, 1890-91. 23

Oni petas anglan vortaron kun elparolo interŝanĝe kun novaj Esp. libroj aŭ 3 antikvaj piaj libroj. F-no L. Petit, 23, av. du Ch. de fer, Vitry-s-Seine, Franc. 24

S-o A. Marich, Ulloj 59, 4, 8, Budapest IX (Aŭstrio), deziras aĉeti la unuajn n-ojn de E. K. 4-paĝa, kiam ĝi estis nur aldono de franca revuo *Aube*.

IV

— KORESPONDADO —

So Marcel Génarmont, 11, place de la Gare, Moulins (Alliers), deziras korespondadi per ilustrit. poŝtkart, kun nefrancaj esperantistoj. 13-6

Marco Lliró, Escoler Pies, Sabadell, Espana. Katolika pastro, interŝanĝ. leterojn kun lertaj katol. literaturistoj ĉiulandaj pri respektiva nacia literatura historio. 5-5

So H. Voirin, Saint-Clément (Met-M.), Franc. Interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn kun ne-Eŭropanoj. 17

So F. Rawicki, Seminariano katolika; deziras korespondadi, se eble kun pastroj kaj seminarianoj. Adr.: Seminario katolika en Wloclawek, Polujo. 19

Feliks Knapski, Zgierr, Piotrk. gub. Poluj-Rusl., respondas tute senpage pri komercaj, industriaj k. negocaj informoj tie ĉi en Polujo. Kolektas k. interŝanĝas poŝtmarkojn. 22

F-no Bernard, ins., 1, rue S. Martin, Angers, Franc., deziras korespondi esperante aŭ germane kun Dresdenano aŭ -ino pri la Kvara. 28

13-jara knabo, Hermann Wuttke, deziras korespondi per poŝtkart. ilustrit. Adreso: Pionierstrasse, 21, Magdeburg, Germanl. 35-sp

S-o Lawrence Klassen, North Amherst, Ohio, U.S.A. deziras korespondi kun alilandaj geesper. per poŝtkart. ilustr. Nur bele kolorit. kartoj. Ciam respondos. 30

Junaj Esperantistoj, kiuj volas korespondi kun junul. en Esperanto volu sendi iliajn adres. al la rondeto « Junaj Esperantistoj en Graz ». Adr.: S-o Karl Bartel, Graz, Aŭstr. Friesbrichg. 29. 32

So Henry Coppin, 3, rue François-Cuvelle, Douai (Nord), Franc., deziras korespondi letere aŭ poŝtkarte. 30-j

1. — INSTRUO —

Stenografio. Sistemo por franca lingvo, aprobita de E. Duployé, 2 fr. Sin turni al aŭtoro P. Bavay, Le Havre (S.-I.) kiu volonte sendos senpage sian sistemon al ĉiu, kiu sendos al li informojn pri ĉio tuŝanta memor-arton. 9

Amuzanta! — Cours méthodique d'Esperanto, legu E. K. n-o 41, okt. 1907, p. 29; afrankite: 0,50. P-o Servais, Fosses (Namur), Belg. 10

S-o J. Mistler, direktoro de la dua-grada lernejo en St-Claude (Jura). Komercist-kurso. Instruado pri modern. lingv: Angla, Germana, Esper. Ital. Kursoj dum libertempo en aŭg. k. sept. Petu prospektojn. 3-5

V. J. Baras, instruisto pensiula en Bosson-Werbomont, Belg. k. lia filo Alexis, diplomita stenografisto (Duployé) akcept. lernantojn. Loko sana k. pentrinda. Fontoj de minerala akvo. 29

— DIVERSAJ —

Aĉetantoj! Atentu pri la maljustaĵoj, kiujn suferas mult. laboristoj. Favoru per viaj aĉetoj la firmojn, kiuj respektas principojn de justeco por siaj salajratoj. Anigu al *Sociala Ligo de Aĉetantoj*, aŭ fondu tian ligan, se ne ekzistas unu en via land. Petu inform. de Fno Magnier, 18, rue de l'Enseignement-Mutuel, Boulogne-s-Mer (P.-de-C.), Franc. 16

Franco 33-jara, bone edukita, scianta perfekte franc. lingv., deziras oficon de « akompananto » en familio ne-franca, aŭ de interpretisto en fremda hotelo. Skribu al S-o Hingant, 3, rue Boucicaut, Tours, Franc. 33-m

Kontraŭ Pornografio. Ni batalu kontraŭ ĝi anigante al unu el la Ligoj: « Moralité Publique », 47, rue des Petites-Ecuries, Paris; — Ligo kontraŭ « trolibereco » de stratoj, 10, rue Pasquier, Paris. 34-0

Por blinduloj. Oni povas helpi al disvastigo de Esperanto inter blinduloj, sin farante membro protekta de la Blindulgrupo Esperantista. Kotiz. 1 fr. jare. Woluwe, Belg. 31

Kliniko de Do Ponzio (homeopatio kompleksa). Senpagaj konsult. per korespondo. 1-a *Petit Manuel d'homœopathie complexe* estos sendata senpage kaj afrankite, por propagando, al ĉiu persono, kiu per afrankita letero petos ĝin de Direktor de la *Clinique*, 2, rue Portalis, Paris-8.

APEROS DUM LIBERTEMPO

Lando de Mirakloj.

Ruĝuloj, n^o 2 el *Socialaj Demandoj*.

Flavuloj, n^o 3 el *Socialaj Demandoj*.

Imitado de Jesu-Kristo; 1-a libro.

ESPERO KATOLIKA

HONORATA PER APOSTOLA BENO DE PIO X-a

la 27-an de junio 1906

EKLEZIO KAJ SCIENCO

Tia estas la titolo de artikolo, kiun ĵus donis al *Correspondant* (10 dec.) Monsinjoro Mignot, ĉefepiskopo de Albi. Ĝi celas malaperigi iajn antaŭjuĝojn, ĉiujn resumatajn en tiu militkrio : « Eklezio kontraŭstaras Sciencon ».

La racionalista kritiko neas *a priori* rivelitan kredon. Ĝi estas antaŭjuĝo sensaĝa. La revelo estas ebla, kaj ĝi ekzistas.

Sed se oni ne volas ke ĝi ekzistu, tio estas ĉar ĝi malhelpas la sciencon. Alia antaŭjuĝo. Inter revelo kaj scienco, nenia konflikto ebla tiu konflikto « troviĝas nur inter la sciencaj eltrovoj kaj la klarigoj, kiujn la homoj faris pri la Dia parolo ».

« La Sankta Skribo estas antaŭ ĉio leĝaro de fido kaj amo, la vera montro al vojo kondukanta en ĉielon, kaj al rimedoj necesaj por fari la vojaĝon. Ĝi ne estas traktato pri astronomio, mekaniko, kuracarto aŭ historio; kaj ĉar la Dia aŭtoro volis, ke lia verko restu netuŝebla, li donis al ĝi nenian senpere sciencan karakteron. Li inspiris ĝin laŭ la lingvaĵo kaj tiamaj ideoj; ĉar alie ĝi estus estinta nekomprenebla de tiuj, por kiuj ĝi estis unue difinita. En tiu sankta libro, ekzemple, Arkimedo ne estus trovinta sian teorion pri levilo, Pitagoro sian pri helio-centriĝo, Pasteur sian mikroban teorion, niaj nuntempaj scienculoj la ecojn de α radiumo aŭ la senfadenan telegrafarton.

La Biblio, kiel la Eklezio ĝin konservanta, nur senpere

detenas la rivelitajn verojn, kaj pere la verojn ellasitajn al esploroj kaj diskutadoj de la scienculoj *Tradidit mundum disputationibus eorum* (Li ellasis la mondon al iliaj disputoj). Ofte la plej bona komentario pri la Sankta Skribo estas la homa scienco, flanka elmonstro de la Dia ago kaj volo en la mondo.

Oni riproĉas Moison, ke li skribis sian hegzameron per maniero malmulte scienca. Ĉu li povis alie fari? Ĉu oni volus, ke li estus akceptinta la hipotezon de Laplace aŭ tiun de Faye? Ĉu la scienco diris sian lastan vorton, kaj ĉu ni estas tiel certigataj pri ĝiaj rezultatoj en la nin okupanta demando?

Moizo, inspirita de Dio — ĉu li estas koninta aŭ ne koninta la manieron pri la monda kreo — parolis kaj, kredeble, pensis, kiel oni parolis kaj pensis en lia tempo. Inspirante rakonton difinitan por primitiva popolo, Dio ne estis pli devigata fari astronomion ol konigi la ecojn de la vapore aŭ de la elektro. »

La Eklezio, rajtigita interpretisto pri la Sankta Skribo, difinas la kredon, sed « pri scienca materio, ke reprezentantoj de Eklezio ne scias pli ol iliaj samtempuloj ». Pri tio, la Eklezio ĉiam estis principe prudenta kaj konservema. Tiuj ĝin riproĉas, kiuj ne konas la necertecojn kaj ŝanĝojn de la scienco.

Kaj cetere estas grave ĉiam distingi la aŭtentikan instruadon de la Eklezio el opinioj de ĝiaj pli malpli permesitaj reprezentantoj. Kiom da filoj de Eklezio danĝerigis ĝin per siaj eraroj!

Kaj Lia Episkopa Moŝto Mignot klarigas sian tezon per ekzemplo la kondamnoj faritaj kontraŭ la ekzistado de la Antipodoj.

« Cetere, se Gregorio de Nazianze, Laktanco, sankta Basileo, sankta Ambrozio, sankta Aŭgusteno kondamnis tiun doktrinon, se Papo Zachario minacis malposedigi la Salzburgan Episkopon, ĝi ne estas nur, kiel Laktanco, pro kaŭzo de nekonstanta ekvilibro, sed tial ke la partianoj de la Antipoda loĝebleco argumentis, ke tie

vivas aliaj homoj, alia raso elirinta el alia Adam.

« Certe Zachario ne kredas Antipodojn, sed li kondamnas la neadon pri la unueco de la homa raso, kaj pri la redempto de homoj per Kristo.

« Oni devas havi spiriton sufiĉe libereman por ne postuli de ia jarcento sciencajn konojn, kiujn ĝi ne povis posedi. Kiam oni ĉirkaŭiris teron, oni konstatis, ke ĝi estas sferforma kaj ĉie loĝata. La scienco nenion aldonis al la simbolo, sed ĝi sciigis al Eklezio-rajtigitoj kion ili nesciis, kion ĉiuj nesciis. »

Pri alia ekzemplo, la proceso kontraŭ Galileo, oni konstatas ke la katolika Eklezio lasas al ekzegezistoj kaj scienculoj pli da libereco ol la disiĝantaj eklezioj. Ĉar ĝi estas pli certa pri kredo, ĝi estas malpli malfida al scienco.

La Eklezio ne kontentiĝas doni pasporton al tiuj eltrovoj, kaj ilin sankcii kiam ili estas certaj, sed ĝi metas ilin en sian instruaron, ĝi korektas la erarojn de l' estinto per la lumo de l' estanto. Ĝi scias ke, se la rivelado devenas de Dio, la scienco ankaŭ devenas de Li, kaj ili ambaŭ devenantaj de la sama Dio, ne povas sin kontraŭdiri; sed ĝi tre prizorgas ne konfuzi la certajn rezultatojn kun la hipotezoj de la scienculoj, nek la homajn pensojn kun la pensoj Diaj.

« Certigita posedi la veron, se ne tute plene, almenaŭ laŭ la mezuro alfarita de la Providenco al ĉiu centjaro, ĝi ekzamenas, komparas, alproksimigas la diversajn elementojn, kaj forĵetas tiujn, kiuj ŝajnas malkonsenti kun la kondiĉoj de ĝia vivo kaj Dia rolo. Se la homa scienco laboras, la katolika scienco ne restas neaganta. La Sankta Spirito ja ne inspiras la Eklezion, ĝi helpas ĝin, ne liberigante ĝin de laboro.

« La senerareco, kiu agas, ĉu en ĝeneralaj konsiliĝoj, ĉu en la persono de l' ĉefa pontifiko, parolanta *ex cathedra*, ne konsistas el nova rivelado, el elmontro tuja kiel tiu de la Pentekosto, sed el la inventaro de l' trezoro de la familia patro, el kiu ĝi tiras kaj lumigas, sub la direktado

de l' Sankta Spirito, tion, kio konvenas al ĉiu tempo.

« Kiu ne tute nescias la teologiajn demandojn, tiuj scias kiajn longajn preparajn laborojn postulas la difinoj pri la kredo. Ne suprenirante ĝis la fondo de la Kanono de la Sanktaj Libroj, nek eĉ ĝis la konsiliĝo en Trente, sufiĉas legi la Papan sigelleteron pri la Senmakula Patriniĝo por lerni, de la buŝo de Pio IX-a, kun kiel granda zorgo estas demanditaj la episkopoj de la tuta mondo, kiel atestantoj pri la tradicia kredo, la Universitatoj, Doktoroj, la plej famaj teologiistoj.

« Anstataŭ kontraŭstari la lernadon pri sciencoj, la Eklezio instigas al ĝi. Kial ĝi kontraŭstarus, ĝi kiu dum multaj jarcentoj konservis la sciencon kaj savis ĝin de la ruinego, kreante ĉiam lernejojn kaj universitatojn? Kaj ĉu la ĉefa Pontifiko, por respondi riproĉon, kiun oni senĉese adresas al ni, ne ĵus ordonis la fondon de Scienca Societo, kies celo estas antaŭgardi la kristanan popolon kontraŭ la hazardaj teorioj, kiujn iliaj elpensantoj donas al ni tro ofte kiel nerefuteblajn konkludojn de la scienco.

« Ĝi scias, ke la kredo de siaj infanoj pligrandiĝas laŭmezure kiel plivastiĝas ilia intelekta horizonto. La psalmo « La ĉieloj antaŭsciigas la gloron de Dio » estis vera, kiam la okulo perceptis apenaŭ kelkajn milojn da steloj; ĉu ĝi estas malpli vera nun, kiam la okulo de la fotografilo malkovrigas plurajn centojn da milionoj, hodiaŭ kiam ni scias, ke la Eterna Paŝtisto prizorgas tiom da nekonitaj mondoj, kiom estas da homoj ĉi-sube. Ju pli la Dia grandeco nin premezas, des pli la neceseco de Lia estado estas neforĵetbla. Nei Dion ne estas nur grandega eraro, ĝi estas eraro iĝinta pli evidenta pro la progreso de la sciencoj, kaj multobligita milionojn da fojoj. »

Poste, la klera episkopo klarigas, ke la Eklezio ne kontraŭstaras plie la kritikajn kaj historiajn esplorojn.

Trad. Paul DESCHAMPS.

PRI LA FORTSPIRITULOJ

Ĉu la fortspirituloj scias ke ironie ili estas tiel nomataj? Kia pli granda malforteco ol ne-certeco pri la kreinto de sia persono, de sia vivo, de siaj sentoj, de siaj konoj kaj pri la fino okazonta! Kia pli granda senkuraĝeco ol dubi ĉu sia animo estas materia kiel ŝtono kaj rampulo aŭ putrebla kiel tiuj malnoblaj kreitaĵoj? Ĉu ne pli da forteco kaj da grandeco ricevante en nia spirito la ideon de Estaĵo supera je ĉiuj estaĵoj, kiu ilin ĉiujn faris kaj al kiu ĉiuj devas aliri; de Estaĵo la plej perfektega, kiu estas pura, kiu ne komencis kaj ne povos fini, kies imago estas nia animo kaj, se mi, kuraĝas tion diri, estas ero laŭ spirito kaj nemortebleco.

Oni devus tre serioze sin provi kaj ekzameni antaŭ ol sin anonci fortspiritulon aŭ malĉastulon, por ke, almenaŭ kaj laŭ tiaj principoj, oni mortu kiel oni vivis; aŭ, se oni ne kuraĝas tiel malproksimen iri, decidi ke oni vivos kiel oni volas morti.

Mi volus vidi sobran, moderan, ĉastan, ĵustan homon, diri ke Dio ne ekzistas: li parolus almenaŭ sen intereso, sed tia homo ne renkontiĝas.

Ĉu la homoj estas sufiĉe bonaj, sufiĉe fidelaj, sufiĉe ĵustaj por meriti nian tutan konfidon kaj almenaŭ ne esperigi ke Dio ekzistas, al kiu ni povus peti novan juĝon kontraŭ la alia kaj al kiu peti helpon kiam de ili ni estas persekutataj kaj perfidataj.

Elĉerpita el « la *Karakteroj* » de La Bruyère,

R. BADERT.

LA NOMO DE L' BESTO

Pri kia besto ni parolas? Pri la besto el la maro, anoncita en la 13-a ĉapitro de l'Apokalipso. Tiu besto alia estas ol la best' el la tero pri kiu sankta Johano profetas

en la sama ĉapitro. Sed ĉu ni devas ĝin identigi kun la besto kiu supreniras el la abismo, laŭ la 11-a ĉapitro de la supredirata verko? Multaj ĝin faris: ili opiniis ke la ambaŭ bestoj estos la Antikristo. Tiu komprenaĵo ne estas malvera, sence ke la best' el la abismo povas konsideriĝi kiel unu kapo de la best' el la maro, kies la Antikristo estos la perfekta personiĝo. Cetere ambaŭ bestoj prezentas la saman misteron de pekemo. Sed tio ne estas la sol-ebla signifo, ĉar, kiel ĝi ŝajnas, la best' el la maro prezentas pli bone la pekemulon sendifine ol unu difinan pekemulon. Kia do estas tiu besto? Estas la homa besto, la « *animalis homo* », la homo sin mem diiganta, kaj adoranta sian karnon kaj siajn pasiojn en la idolaj emblemoj estas la antikrista homaro kaj homeco kune. Tiam kia estas la best' el la tero? Estas la hebreframasonaro. Sed el la Johana teksto kiel ŝprucas tiu komprenaĵo? Tiel, unue parolante pri la best' el la tero. Tiu-ĉi havas aĵojn kiuj ĝin elmontras kiel hebrea potenco. Ĉar Hebreoj estis Moizo, Aarono kaj Elio. Nu, kiel Elio, la besto malsuprenvenigas la ĉielan fajron; kiel Moizo, ĝi havas du kornojn; kaj kiel Aarono kiu adorigis la orbovidon, ĝi adorigas la beston el la maro, precize la homon. Kaj sendube, la celo de la framasonaro estas malkristanigi la mondon, tio estas ĝin idolanigi. Nun pri la unua besto ni povas diri ke ĝi estas vere la nekristana homo, ĉar ĝi eliras el la maro kiu emblemas la idolanajn naciojn. Vere ĝi havas la aĵojn de l' idolanreligio, tial ke ĝi prezentas la karakterojn de l' Drako, la sep kapojn kaj la dek kornojn. Plue ĝi proklamas grandaĵojn, kiel la homrajton; kaj ĝi elparolas la blasfemojn de l' ateismo. Nu, la best' el la maro havas markon, tiun de la *nekredemo*, kiun la best' el la tero celas meti sur ĉies manon (t. e. la praktiko) aŭ frunton (t. e. la pensado).

Fine la unua besto havas ankaŭ nomon, kaj korespondan nombron. Kiu estas tiu-ĉi nombro? Estas tiu de la homo, ne de unu difina homo, sed de homo sendifine la artikolo, efektive, ne estas uzata en la greka

teksto. Ni aldonu ke sankta Johano greke skribis kaj por grekaj legantoj. Tiel la supredirita nomo estas unuparte memorigonta la ideon de sendifina homo, kaj aliparte per siaj literoj dononta la nombron 666. Troviĝas ke la nomo estas tiu de unu dio kiu, laŭ la penso de l'Egiptanoj, prezentas la unuan homon, kaj ĉiun homon: do la sendifinan homon. La jena dio, ĉe la superstiĉa popolo, estis kune Osiris kaj la bov' Apis: tial ĝi estis nomata Osiris-Hapi, Osar-Hapi kun kio oni faris en la greka lingvo: *O Sarapis*, *O Sérapis*. Nu, pri tiu-ĉi la diservo, tempe de sankta Johano, estis universala en la Roma imperio. Sed vidu, la sumo de la literoj de l'onomo *O Serapis* (greke).

<i>o</i>	70
<i>s</i>	200
<i>e</i>	5
<i>r</i>	100
<i>a</i>	1
<i>p</i>	80
<i>i</i>	10
<i>s</i>	200
	<hr/>
vere faras	666

Paŭlo THIERRY.

KELKAJ FLOROJ SOCIALAJ

LA GARDENETO

— Rapidigu iom, Frans'o, diris la juna virino jam por la tria fojo, zorgu ke ni ne venu tro malfrue.

— Vi havas la fervojfebron, Mario, li ridetis, kaj trankvile li alportis la te-tason al siaj lipoj por fini sian matenmanĝon. Ni havas ankoraŭ duon-horon da tempo,

Kun silenta plezuro li vidis kiel ŝi ordigis la seĝojn, provis ĉu la pordoj kaj fenestroj estis bone fermitaj, momenton haltis antaŭ la spegulo por vidi ĉu la ĉapelo vestis bone, la restaĵon de la matenmanĝo metis en la kuirej-ŝranko kaj tiam senpacience atendis kun la febra

deziro de infano, kiu ekvidas la kristnaskan arbon.

Vidu, Franso, kiel bela suneto! Ho, mi ne povas diri al vi kiel ĝoja mi estas.

— Eble ni havos ankoraŭ la pluvon, li diris, gaje rigardante sian edzinon flanke, kiam ĝi estas matenfrue tiel bela, ofte sekvas malbona vetero!

— Ne, mia karulo, ŝi respondis, vi nur volas teruri min, sed mi ne lasas forigi mian ĝojon! Nun estas sufiĉa, venu kun mi!

Ŝi tiris la te-tason de liaj lipoj kaj li ride leviĝis, prenis sian ĉapelon kaj ankaŭ la pakadon, kiu jam longe estis sur la seĝo. Zorge li fermis la pordon, ili malsupreniris la kvar krutajn ŝtuparojn kaj ili eliris el la granda loĝej-kazerno en la suna strato.

— Bonan vojaĝon kaj multe da plezuro, afable estis dirinte la najbarino al ili, ĉar la juna diligenta duo estis tre amata de ĉiuj najbaroj.

La Pentekosta suno brilis per klara beleco super la floranta tero kaj la Dimanĉaj homoj iris tra la stratoj. Ĉio estis ĝoja. Estis kvazaŭ la zorgoj de la vivo, kiuj kutime en tiu ĉi laborista strataro sidis sur la sojloj, estis kaŝintaj kun la ombro de la nokto.

« Du liberaj tagoj, du festo-tagoj kaj kampe, meze de la verdaĵo, paroletis la juna virino, rigardante per brilantaj okuloj sian edzon. Diru Franso, la mondo ne estas tiel tute malbona, kiel vi ofte diras.

« Vi estas infano, li respondis, sed vi estas prava, ni devas hodiaŭ ĝoji kiel eble plej multe, kaj tio ne estos malfacila kiam oni ricevos nin kun malfermitaj brakoj.

« 'Cu vi tre certe scias, ke ni ne malhelpos nian fratinton? Vian fratinton mi konas, tiu estas tre bona kaj estos feliĉa pro nia vizito, sed lia edzino eble alie pensas pri tiu urbopopolo, kiu dum la Pentekostaj tagoj venas loĝi ĉe ŝi.

Franso trankviligis sian edzinon, kiu iom estas timema. Jen estas jam la stacidomo. Grandega aro plenumis la bordmarŝejon, kaj ili havis iom da peno por trovi ne okupatan lokon en la plenega vagonaro; ŝajnas kvazaŭ

la tuta granda urbo estis tie, por forkuri el la mallarĝaj stratoj kaj for la altegaj kamentuboj kaj rapidiĝi al la libera, verda, suna mondo.

Mario ne malmulte ĝojis, ke ĝi okupas lokon ĉe la fenestro; tio permesis al ŝi rigardadi eksteren, kaj la supren kaj malsupren dancantaj telefonpalojn kaj arbojn, kaj poste la verdan kampon, kie la unuaj floroj ridis en la bela sunlumo, kaj poste la malluman arbaron, kiu sin etendis en la malproksimeco.

Kiel bela estis ĉio tie ĉi! La granda urbo jam longe ne estis plu videbla; en la malproksimeco, al la horizonto staris ankoraŭ kelkaj fabrikejaj kamentuboj kiel nigraj kolonoj, kaj nigra, malluma fum-nubo pendis super ili. Ĝi kaŝis la bruadon, la fumon kaj polvon; la rapidegan senpaciencon marŝadon de la laboro; la mallarĝajn, malplenajn kaj senlumajn abelejojn, kiujn oni nomas ordinare laboristaj loĝejoj.

Mario spiris profunde kaj lasis ventumi la freŝan aeron tra la malfermita fenestro.

Kiel longe ili estis ŝparintaj por havigi al si la ĝojon kaj plezuron de tiu ĉi malgranda vojaĝo? La starigo de ilia juna mastrumo bezonis pli da mono ol ili komence estis kalkulintaj. Ili estis devintaj priparoladi kaj prikalkuladi, ĉu ili povos permesi al si tiun ĉi elspezon. Kaj fine ili ĝin povis fari, eĉ ili havis du frankojn plie por aĉeti ian donacon por la fratino!

Karese Mario premis la pakadon, kiu kuŝis apud ŝi, kaj tiam rerigardis tra la fenestro la belecon de la printempo, kiu ŝajnis al ŝi, infano el la granda fabrikurbo, kvazaŭ fabelo. Nun ŝi vidas « la landon », la veran landon, ne ia troege vizitata rifuĝejo, kien Dimanĉe alfluas la granda fluo de urb-loĝantoj por malpurigi la puran landan karakteron kaj maltrankviligi la pacan silentecon; sed malgrandan vilaĝon, meze de la ankoraŭ nemalpurigita lando. La lulilo de sia bona edzo estis starinta tie, kaj kiom multe li estis rakontinta al ŝi pri tio!

Afable ŝi rigardis lian severan vizaĝon kaj aŭdis tiam,

kiel li kun sia najbaro en la vagono, prudenta maljuna viro, parolis pri la marŝado de la aferoj. Tial ŝi denove direktis siajn okulojn kaj pensojn en la suna verdaĵo eksteren, post la dancantaj telefonpaloj.

« Eliru ! » gaje kriis Franso, kaj nun ili staris sur la preskaŭ malplena bordmarŝejo de malgranda stacidomo. Lia frato, vilaĝa ĉarpentisto, iom pli aĝa ol Franso, ricevis kaj bondeziris ilin kaj kondukis triumfe siajn urbajn vizitantojn tra la silenta vilaĝstrato al la agrabla dometo, kiu estis sia propraĵo.

Korege ili estis salutitaj de ilia fratino, kies vangoj estis ruĝegaj de vivegeco kaj peno; ĉar ŝi jus venis de apud la bolantaj potoj en la kuirejo, kie ŝi estis tre okupita por honorigi siajn vizitontojn.

Kiel ili ĝuis la tagmanĝon kaj kiel konfida kaj gaja estis ilia interparolado !

Sed laŭ sia kutimo Franso baldaŭ komencis socialan disputon kaj trovis plurajn malantaŭaĵojn en la vilaĝaj situacioj. Sed Mario nenion volis aŭdi pri tiaj aferoj.

Tuj post la tagmanĝo, kiam la viroj fumis siajn cigarojn, ŝi kuris eksteren, al la ĝardeneto malantaŭ la dometo, kien sia afabla fratino baldaŭ sekvis ŝin.

Ho ! tiu ĝardeneto ! Mario estis ĉiam konsiderante kiel ne atingebla lukso havi propran ĝardeneton, kaj tiuj ĉi simplaj homoj havis unu, kaj kiel belan ! Estas nur necesa ke ŝi eliru la pordon, kaj tiam la floroj ridis al ŝi kiel infanokuloj. Kaj kiel bone estis ĉio zorgita !

— Sendube vi havas bonan ĝardeniston je via servo, opiniis Mario. 'Sia fratino ridis.

— Ni ambaŭ, mia edzo kaj mi, estas nia propra ĝardenisto, ŝi respondis, ni solaj zorgas la tutan ĝardenon, ni fosas en la printempo kaj semas kaj plantas ; se estas necesa ni akvigas, kaj kiam ĉio estas matura ni rikoltas. Tiamaniere oni havas la plej grandan plezuron per la ĝardeneto.

— Ho, kiel bela kaj agrabla devas esti tio ! ekkriis Mario. Kiel bele staras tie la junaj pizoj kaj ĉiuj koloraj

floretoj! Kaj tie ĉi la junaj karotaj kun la etaj folietoj! Jen, vidu, ankaŭ fragojn! Sed kia speco da plantoj estas tiuj, kiuj staras tie tiel memstaraj en grandaj linioj?

— Estas grandaj pizoj, respondis la fratino kun rideto pri la malmulta planto-scio de la urbinfano. Estas la plej amata manĝaĵo de mia edzo, kaj mi devas tiel planti, ke ni almenaŭ dum 6 semajnoj havas grandajn pizojn.

— Ho! kaj tie ĉi?

— Estas asparagoj, kiujn ni ĵus manĝis. Tiuj estas difinitaj por niaj vizitantoj, sed bedaŭrinde ili fariĝas tro rapide malmolaj.

Nun oni admiris la florojn, la miozotojn kaj lekantojn, kiuj ornamis la ĝardenbedojn, kaj Mario ne povis sufiĉe longe rigardi kaj admiru la junan verdan vivon, kiu tie burĝonis kaj floradis.

Kiam ŝi vespere sole estis kun sia edzo, ŝi longatempe rigardis silente kaj pripensante antaŭ ŝi; subite ŝi diris: 'Cu vi scias Franso, kion la plej mankas al ni en la urbo?

— Nu, diru al mi, kion?

— Ĝardeneton? Ho! se ni havus ankaŭ ĝardeneton, en kiu ni povis okupi kaj Dimanĉe promenadi kaj sidi! Ĝardeneton, kiu estus nia propraĵo kaj kiun ni povus zorgadi!

— Jes, mia karulino, sed tio ne povas esti en granda urbo. Tie la spaco estas tro kara.

— Jes, sed kial loĝas ni en la granda urbo?

— Tial ke oni povas gajni tie sufiĉe da mono. La pagoj estas pli bonaj, estas tie pli da laboro, ĉar la granda industrio estas tie.

— Sed kial oni konstruas tiel dense, kial devas la homoj loĝi tiel proksima, unu ĉe l'alia? Kaj kial la grandaj kazernoj, en kiuj ankaŭ ni vivas kun 10 kaj 15 aliaj familioj? Oni devis konstrui la fabrikejojn meze de la kamparo, kie estas multe da spaco kaj kie ankaŭ la laboristo povas pensi pri propra dometo.

— Nun, tio tute ne estas malsaĝa, ridis Franso. verku

iam socialan programon, ĉar mi estas plene konvinkita ke multaj saĝecoj ekvidus la taglumon !

— Nun vi mokas, ŝi respondis.

La kapo plena je pensoj pri la bela ĝardeneto ŝi ekdormis kaj kun tiuj pensoj ŝi ankaŭ leviĝis. Apenaŭ ŝi povis atendi por vidi ĝin en la brilo de la matensuno kaj admirari en la brilego de la matenroso, kaj kion ankaŭ ŝi vidis en la vilaĝo : la beletan preĝejon, la malnovan tilion sur la vendejo, la grandan aron de blekantaj anseroj kaj anasoj en la vilaĝa lago, — ĉiam siaj pensoj reiris al la ĝardeneto. Si rigardis la luksajn plantojn kaj opiniis vidi, ke ili dum la nokto iom estis kreskintaj ; ŝi imagis kiel agrablega ĝi devus esti planti kaj zorgadi, kaj poste rikolti la fruktojn de propra diligenteco. Kaj tiam subite aperis antaŭ ŝiaj okuloj l' imaĝo de la granda urbo, de la polvaj stratoj, la altaj domoj, plenaj de homoj, la altege leviĝantaj fabrik-kamentuboj kun ilia densa fumo, kiu malrapide etendiĝas super la urbo, kaj nur tie ĉi kaj tie en la butikoj iom kompatinda verdaĵo. Kial ĝi devis esti tiel, tiel malbela kaj sufoka mallarĝa, ĉar do la mondo tie ĉi estis larĝa kaj suna, verda kaj floranta ? La urbo aperis al ŝi kvazaŭ malliberejo, kaj ŝi abomenis reiri en ĝi.

Rapidege la tagoj estis pasintaj, kaj baldaŭ la juna duo ree sidis en la vagonaro. La lastan disrigardon Mario jetis sur la ĝardeneto, kaj nun ŝi silente sidis en angulo de la vagono kaj pensis al la ĉarma paradizo, tiel amata de ŝi. En la brako ŝi zorge portis la florpoton kun la floranta filiko, kiun ŝia fratino estis doninta al ŝi. Jam alvenis la granda urbo. Ili eliris kaj estis flanken puŝitaj kaj ĉirkaŭitaj per la fluo de la mova vivo. Lacie ili alvenis al la kazerno, kie ili loĝis kaj supreniris la krutajn ŝtuparojn. La tutan nokton Mario revis pri ĉarmaj, florantaj ĝardenetoj ; sed la alian tagon estis nenio restinta de tiuj revoj, krom la simpla filiko sur la fenestra benko.

— Franso, diris la juna virino, vi parolas tiel multe pri la sociala neceseco, pri la mizero de la laboristoj. Sed

kiam oni zorgos, ke ni ne devas pli longe loĝi en tiuj abomenaj, altegaj domoj, ke ni havos aeron kaj sunon kaj ĝardeneton, tiam ja multe estos plibonigita.

— Vi estas prava, diris ŝia edzo kun severa mieno, kaj li rapidis je lia tagmanĝo por fari la kutiman iron al la fabrikejo.

*
* *

Tuta jaro estis pasinta. Denove la tero beligis per floroj kaj denove estis alvenanta la Pentekosta festo. Kiel antaŭ unu jaro ankaŭ nun iris Franso kaj Mario al la stacidomo, sed tiun ĉi fojon por ricevi viziton, la longe promesitan viziton de la « lando ».

— Dankon al Dio! ekkriis la fratino de Mario, kiam ili vidis ilin reciproke en la homamaso. Vidu, Mario, kion mi kunportis por vi! 'Si levis la fermilon de sia korbo kaj montris la ĝuan enhavon flavaj pizetoj, blankaj asparagoj kaj kelkaj salatoj. Mi pensis, ke vi sidas tie ĉi tute inter muroj, kie nenia bonaĵo kreskas.

Mario afable dankis ŝin kaj ŝanĝis gajan rigardon kun sia edzo. Kiam ili kelktempe estis marŝintaj, opiniis subite la fratino de la « lando », ke estis kvazaŭ ili forlasis la urbon!

— Tio estas vera, ekridis Franso, ni loĝas nun duone en la urbo, kaj duone kampare. Ni havas nun belan dometon de la *Ŝpar-kaj Konstru-Unuiĝo*.

— Aĉetita? demandis lia frato.

— Ne, por kio estas pli ol la luo, oni donas al ni porciojn. Ĝi estas kooperativo. Jen, ni jam estas!

Li malfermis la pordon de la dometo.

— Kaj vidu nun ion tie ĉi! ekkriis Mario, kiu jam estis malferminta la malantaŭan pordon. Oni vidis ĝardeneton, bone kaj pure zorgitan. La pizoj kaj faboj staris en rektaj linioj, la karotoj levis ilian verdaĵon, kaj dikaj verdaj salatoj ridis en la hela matensuno. La fratino de la « lando » kunigis la manojn, tute mirigita.

— Mi vidas, ke mi povis lasi hejme mian korbon! ŝi ekkriis.

— Kion la amo donas, estas plezure akceptita, respondis Mario. Ni nenion skribis al vi pri nia forloĝo, ĉar ni volis surprizi vin. Pri « mia » ĝardeneto mi estas nun fierega. Sed eniru, en momento mi havos la kafon preta.

HOLANDANO.

EVANGELIAJ MEDITOJ

Por nuna tempo,

« *Euntes docete omnes gentes.* »
Irantaj, instruu ĉiujn naciojn.

En la bela festo de Cieliro, Eklezio rememorigas nin, en la Evangelio, pri tiu ordono de Jesu al siaj disciploj. Nia Sinjoro montris per tiuj vortoj, ke la religio fondita de Li estas universala, ke la redempto estas por ĉiuj homoj. Kaj la disciploj, iom mirigitaj (ĉar ili ĝenerale kredis, ke la redempto estis nur por Izraelo), iris al ĉiuj popoloj, instruis ilin pri universala kaj sankta Frateco en Dio, pri Amo, pri Fido Kristana. Kaj ili plenigis Univerŝon per altaj kaj civilizantaj principoj de l' Evangelio.

La nunaj apostoloj de Jesu, la pastroj, devas mediti la diritan ordonon « Irantaj, instruu ĉiujn naciojn ». En la nuna tempo, la movado de l' ideoj ne koncentriĝas en ĉiu nacio. La ideoj transpasas la land-limojn kaj portas sian influon rapide en la tuta mondo. Ĵurnaloj, revuoj, libroj iradas de popolo al popolo, per tradukoj. La influo de presitaĵoj fariĝos des pli forta, ke la lingvo internacia plifaciligos la internaciajn idealajn rilatojn.

Cu pastroj ne tuj komprenos sian **devon** partopreni en la disvastigo de ideoj sanaj kaj altaj, por batali efike kontraŭ ideoj malsanaj kaj malcivilizigaj? Cu ili ne tuj laborados per Esperanto por krei vastan libraron, por fortigi la solan gazeton katolikan en Esperanto? Atentu tion la membroj de *Pastra Esperantista Frataro*.

Mi devas konfesi, ke ĝis nun laikoj helpis min pli ol pastroj. Mi tamen plej sincere dankas la kelkajn kunfratojn, kiuj alportis al E. K. sian sindonemecon kaj laboron. Sed laŭ alia parolo de l' Sankta Skribo *Massis quidem multa, operarii autem pauci* (Grenrikolto ja estas multa, laboristoj tamen malmultaj).

Mi estas mortebla homo. Kio fariĝus pri E. K. post mi, se nenia pastro kutimis kunlabori al la gazeto? Miaj fortoj havas limon. Kiel belan kaj pli interesplenan gazeton mi liverus al la katolikoj, se kunlaborantoj ne mankus al mi! Karaj legantoj, meditu tiujn simplajn pensojn kaj... eltiru mem la konkludon!

EM. PELTIER.

INTERNACIISMO KAJ PACIFISMO

Internaciismo kaj *pacifismo* estas tiaj vortoj kun signifo samtempe tre malpreciza kaj tre vasta, kiajn oni fabrikas ĉiufoje kiam nova fluo de ideoj ekproduktiĝas en ia scienc-fako. Se oni provas precizigi ilian sencon, oni unue vidas, ke ili enhavas ideon komunan al ĉiuj uzantaj ilin, kaj ĝeneralan tendencon; sed aliparte oni konstatas, ke sur tiu fundo komuna staras amaso de tre diversaj konceptoj, interpretoj kaj praktikaĵoj. Kaj la malprecizeco de l' formuloj ja devenas de tiu mikso de komunaj ideoj kaj tendencoj diversaj.

La komuna ideo de ĉiuj internaciismoj kaj pacifismoj estas la ideo de frateco inter la nacioj, de l' interkonsento por kaj en la paco; ĝi estas reakcio, pli malpli sincera, kontraŭ la trouzoj de l' bruta forteco milita; ĝi estas aspiro idealista al viv-maniero aplikota al la tuta mondo, en kiu la konfliktoj pri intereso, igitaj pli kaj pli maloftaj, estus solvataj preskaŭ same kiel nun inter amikoj aŭ en ĉiu civilizita societo, per alvoko de l' interdisputantoj al tribunalo supera. Ne utilas malvolvi plie tiun

ideon : ĉiu scias, ke tia estas la ambicio, revo aŭ utopio — nomu ĝin kiel vi volos — de ĉiuj, kiuj sin nomas internaciistoj aŭ pacifistoj. Mi difinas nek la motivon, kiu igas ilin akcepti tiun ideon, nek ĉu tio rezultas el bonintencaj iniciativoj aŭ plibone el maskoj por egoismo kaj malkuraĝeco mi nur konstatas, ke tia estas la fundamenta tendenco de ĉiuj pacifistaj teorioj.

Sed ni rapidu diri, ke tiu fundamenta tendenco, en praktiko, estas formulata laŭ mil tute malsamaj manieroj, laŭ tio ke ĝi ekzistas en tia aŭ alia aparta grupo, kaj tie la malsamecoj fariĝas tiel gravaj, ke fine ili kontraŭmetas unu al alia la diversajn teoriojn.

1. Jen, komencante ĉe la ekstrem-maldekstro aŭ — se oni preferas — la ekstrema « ruĝa » partio, la nuanco akrega de Hervé, Jaurès, Vaillant, kc. Laŭ tiuj ĉi, la patrolandoj estas monstraĵoj ili estas nur institucioj kreitaj kaj konservataj de la malplimulto, de la kapitalistoj, por ŝirmi kontraŭ ĉia justeco iliajn propraĵojn kaj privilegiojn. Ne ekzistas *naciaj interesoj*, ekzistas nur interesoj de la laboristoj, nune premegataj de l' kapitalistaj privilegioj. Nu, la laboristoj indiferente laboras en tia aŭ alia loko. Partopreni en la konservo de l' patrujoj, estas do verŝigi la sangon de siaj infanoj por la plej granda bono de siaj subpremantoj. La armeo estas la plej malbelega kaj plej cinika elpenaĵo de l' burĝoj do, malaperu la armeoj; necesa estas eltiri la kankrojn! La standardo estu en la sterko!

Jen — ni konfesu — strangan manieron por prediki pacon.

2. Jen, dualoke, la nuanco de Bebel, Vollmar, kc. Laŭ ili ankaŭ, la milito estas malbono konsekvenca de la kapitalista sistemo, kaj sekve oni devas, per ĉiuj praktikaj rimedoj, kontraŭstari ĝiajn revenojn. Sed pri la difino de tiuj praktikaj rimedoj, la Germanoj nete diferencas de la francaj Hervé'anoj. La milito minacas okazi — diras Bebel — ĉiuj laboristoj kaj ĉiuj parlamentanoj de l' interesataj landoj devas uzi ĉiujn rimedojn, kiuj ŝajnas al ili plej efikaj por malhelpi ĝian alvenon aŭ, se

ĝi okazas, por igi ĝin kiom eble plej mallonga. La agado parlamenta, la puŝo per publika opinio, jen rimedoj, kiujn la Germanoj konfesas bonaj kaj efikaj. Pri la ĝenerala striko, la militista ribelo, la « pafiltenilon aeren », kaj la mortigado de l' oficiroj, unuvorte pri la rifuzo de militista servado, kiun la bando de Hervé-Jaurès konsideras kiel sanktan devon de la laboristoj, Bebel volas nenion aŭdi. Efektive, laŭ li kaj la grandega plimulto de l' Germanaj internaciistoj aŭ pacifistoj, ekzistas *naciaj interesoj*, la patrujoj ne estas monstraĵoj, sed necesajoj. Ne estas indiferenta al ili esti regataj de Francoj, en franca lingvo, laŭ franca intelekto. Ili nete deklaras, ke ilia internaciismo ne estas *kontraŭ-naciismo*, sed nur *kontraŭ-kapitalismo*.

3. Al kiu el tiuj du nuancoj korespondas la longa kaj malklara deklaro voĉdonita ĉe la kongreso de Stuttgart kaj preparita de Vanderbild? Ne facile estas diri. En ĝi oni legas, ke « la agado kontraŭ militarismo ne povas esti apartigata el la agado kontraŭ kapitalismo — sed oni tuj plidiras, ke « la militoj estas favorataj per nacionalistaj antaŭjuĝoj, kiujn oni helpas sisteme por la profito de l' potencaj klasoj, kaj por deturni de iliaj devoj pri klasoj kaj internacia solidareco la proletariajn masojn »; jen ideo speciale ŝatata de Hervé. En tiu ĉi oni ne parolas pri striko ĝenerala, nek pri militista ribelo; tiuj rimedoj, preferataj de Hervé, ne estas indikataj en la deklaro; sed oni avertas nin, ke l' agado de la laboristoj en milit-danĝero « estos des pli efika, ke *senĉesa propagando estos preparinta la spiritojn, kaj ke la agado de l' diversaj naciaj partioj estos forte kunaranĝita* ». Sen ke oni diras precize tion, ni komprenas tie ĉi, ke tiu senĉesa propagando estos direktata al militista ribelo. Kaj tiuj formuloj, pli malpli distilataj, perdiĝas en ĝeneralaj konsideroj, kiuj estas plivole maltrankviligaj. Tiu *factum* estas redaktita de Vanderveld, amiko de Jaurès, Hervé, Vaillant estas diri, ke ĝi kliniĝas pli al Hervé ol al Bebel.

4. Sed la socialistoj ne estas solaj por prediki pacon, eĉ ĉe la ombro de standardo kiel *La Guerre Sociale*; ankaŭ la « burĝoj » okupas sin pri tio. De kvindek jaroj precipe, la pacifistaj ideoj vizitadas plurajn homojn, speciale tiujn, kiujn oni nomas intelektuloj aŭ pensuloj. Tiuj ĉi lastaj ne vidas en milito « kankron devenantan el kapitalista vivmaniero, sed plivole malbonon kaŭzitan de naciaj avidecoj. Ankaŭ ili konsideras ĝin ne kiel entreprenon direktatan kontraŭ la laboristoj por eskluza profito de l' kapitalistoj, sed kiel malfeliĉon suferatan de la du nacioj interbatalantaj kaj de ĉiuj socialaj klasoj en ili. Laŭ ili la milito estas procedo nur inda de popoloj ankoraŭ barbaraj, restaĵo el la brutaj moroj de l' pasintaj jarcentoj; hontinde estas, ke oni ankoraŭ ne forĵetis ĝin. Tial, konfidantaj en la ideoj de universala justeco, de humaneco kaj de frateco interpopola; ili esperas, eĉ baldaŭa estonteco, la ĝeneralan senarmigon, la internacian pacon starigitan sur la bazoj de tribunalo kaj internacia arbitracio. Inter la intelektuloj kaj « pensuloj » (?) de l' XX-a jarcento, sendube neniu pli ol Victor Hugo faris pri tiu ideo revojn tiel infanajn aŭ profetaĵojn tiel ridindajn. La ekspozicio de 1867 inspiris al li, ke baldaŭ oni ne diferencigos plu ĝeneralon kaj buĉiston, ke tuta Eŭropo estos la popolo de l' XX-a jarcento ». La milit-deklaro de 1870 ŝajnis al li esti la bapto de tiu grandega popolo; en ĝi li antaŭvidis tre klare la finon de l' tiranio kaj de l' militoj, tuj poste, la grandan « farandolon » de l' nacioj. En tiu atendo, la 14-an de julio 1870, li plantis en sia ĝardeno de Hauteville-House la kverkon de l' Unuigitaj Statoj Eŭropaj ». Ho ve! la milito malvarmigis iom lian liron, kiun li preparis por kanti pri la « fratiĝo universala ». Li konfesis ke,

Frateco, balbutata duonvoĉe
Kaj tro frue, levigas ŝultrojn al malamiko.

kaj li havis la bonspritecon, almenaŭ unufoje, diri

Kiam ni estos venkintaj, ni vidos.

Sed liaj iluzioj rapide reprenis lin kaj, ĉe la vespero de sia vivo, kredanta sin ne erarebla, li trankvile profetis, ke en la XX-a jarcento « la milito, la gilotino, la malamo, la reĝeco, la land-limoj, la dogmoj estos mortintaj, kaj ke la HOMO vivos ! »

Multaj verkistoj daŭrigis ĝis la XX-a jarcento, kiu ne ankoraŭ vidis la militojn ĉesi, la strangajn iluziojn de l' revema poeto, kaj se ili ne plu kuraĝas esprimi ilin sub formo tiel lirika kaj tiel naiva, ili malgraŭe daŭras agi kaj paroli, kiel se iliaj abstraktaj teorioj estus neniel « senflorigitaj » per multjara eksperimentado.

5. Tiuj deklamoj utopiistaj, kiel la furiozaj ekcesoj socialistaj, tiel senkreditigis la *pacifistajn* ideojn, ke kiam oni volas konservi riputacion de homo *pacama* kaj saĝa, oni preskaŭ ne kuraĝas plu paroli pri paco nek pri eblaj penoj por realigi pacon inter la popoloj. Tamen nek la socialistoj, nek la utopiistoj, povas konservi la monopolon de l' sentoj pri universala frateco. Aliaj, kiuj estas nek anarkiistoj, nek revoluciistoj, nek malamikoj de l' saĝeco, kredas havi la rajton kaj eĉ la devon labori por malmultigi pli kaj pli la kaŭzojn de konfliktoj internaciaj; tiuj ĉi opinias ke, sen konservi la koncepton de Joseph de Maistre, sen konsideri la militon kiel aranĝon providencan kaj sanktan, oni devas kontraŭe eviti ĝin ĉiufoje kiam tio ŝajnas ebla; cetere ili ne perdas sin en frenezaj iluzioj; ili ne ignoras, ke la revo pri paco universala, ke la frata interkizado de ĉiuj popoloj, ke la ĵuro pri ĉeso de intermortigado, ke ĉio tio ĉi ne vidiĝos morgaŭ, nek baldaŭ; sed aliparte ili kredas vidi en la nunaj tendencoj de l' popoloj deziron al paco kaj sinceran volon fari ian oferon, ian klopodon; ili kredas vidi en la multegaj kongresoj, konferencoj, institutoj, kc. internaciaj, skizon de pli granda kuniĝo de l' interesoj. Eĉ kelkaj tendencas vidi en la provoj de arbitracio kaj internaciaj tribunaloj ĝis nun proponitaj kvazaŭ parlamenton internacian, kiu sendube ne povos solvi ĉiujn konfliktojn, sed kies aŭtoritato, apogita sur publika

opinio antaŭe avertita, povos tamen starigi gravan barilon kontraŭ la konkvest-provoj de ia nacio. Kaj fine, ĉar ili estimas, ke publika opinio kaj popol-amasoj devas ludi gravan rolon en tia afero, ili nelace faras kongresojn, publikigas verkojn, diskonigas ideojn, unuvorte, faras propagandon pacifistan. Ne utilas citi nomojn : tiu lasta formo de pacifismo havas mem multajn apartajn konceptojn, influatajn de tia aŭ alia koncepto sociala, politika aŭ religia; sufiĉas ke ni konigas la fundamentajn ideojn, kaj plibone estas ne kompromiti iajn tendencojn per apudeco de nomoj, kiuj riskus devojigi aŭ alarmi la legantojn.

JEAN DUHOUX.

El *L'Action Franciscaine*, feb. 1908, tradukis

ARY-BOURG.

(*Sekvo venos.*)

LA VIVO DE L' KATOLIKISMO

ROMO. — Okaze de lia nom-festo, la 19-an de marto, Lia Sankteco Pio X-a ricevis multajn telegramojn de kardinaloj, regnestroj, episkopoj, asocioj, kc. — Pio X-a ricevis la *Ligue patriotique des Françaises*, vasta ligo de virinoj, kiuj agadas per paroladoj, kunvenoj, presaĵoj, por restarigi en la popolo la patriotismon. Pio X-a donis al la Ligo « senliman aprobon », kaj gratulis la estrinojn, tial ke ili ricevis aprobon de 63 episkopoj. La Papo ricevis ankaŭ delegacion de la *Protection de la Jeune Fille* (protektado de junulinoj), internacia organizo, kiu celas protekti la junulinojn, kiuj vojaĝas ekster sia lando. Baldaŭ okazos, en Parizo, kongreso de tiu societo. Estas tre dezirinda, ke iu proponos al tiu kongreso la uzon de lingvo Esperanto.

BRAZILUJO. — Oni skribas el Rio-de-Janeiro : « La dua kongreso de Brazilaj katolikoj estas aktive preparata. Ĝi okazos en julio proksima. Subjektoj traktotaj religia edukado, ekonomia-sociala organizo, disvastigo de la

nova *Union Popular*. Oni ankaŭ preparos la Brazilan pilgrimon, kiu venos al Romo en septembro.

La religia organizo tre multe progresas en tiu vasta lando. La diocezo de S. Paŭlo estas dividata en 5 aŭ 6; oni kreos aliajn en Rio Grande del Norte, en Minas, kc. La kapucenoj predikas evangelion, inter multegaj malfacilaĵoj, ĉe la Indianoj de Parapanema. La episkopoj estas veraj misionistoj. M-ro Marcondes, helpanta episkopo de S. Paŭlo, en pastoralaj vizitoj, faris sur ĉevalo pli ol 2.000 kilometrojn, donis ĉirkaŭ 26.000 konfirmaciojn, kaj pli ol 10.000 komuniojn. — Oni vidas, ke Katolikismo ne ankoraŭ perdis sian efikon!

ARGENTINA RESPUBLIKO. — *L'Union Patriotica*, katolika organizado por elektoj, tre bone progresas. Oni daŭrigos la fondon de *Katolik-Kluboj por laboristoj*. La subskribo por fondo de *Katolika Universitato* ricevis, per episkopo de Tucuman donacon da 10.000 pesos.

USONO. — *Nombro de Katolikoj en Saint-Louis*. — Missouri estas sur la oka vico de l' ŝtatoj de la nacio pro ĝia katolika loĝantaro.

La ĉefdiocezo de Saint-Louis, kiu enhavas la orienton kaj duonon de l' ŝtato kalkulas 500.000 katolikajn loĝantojn; ĉirkaŭe 350.000 estas en Saint-Louis.

Du urbaj parokoj: *Sanktaj Petro kaj Paŭlo* kaj *Sankta Brigito*, havas po 9.000 loĝantoj, dum la meznombro de l' aliaj urbaj parokoj estas 2.500.

45 p. 100 de la personoj, kiuj mortas en Saint-Louis, estas enterigitaj en la katolikaj tombejoj.

Laŭ la jarlibro, estas 13.887.626 katolikoj en Usono. Tio montras kreskadon de 788.073 kompare kun la lasta jaro.

Kalkulante la katolikan loĝantaron de Filipinaj Insuloj,

ATENTU ! — *Unu el la amikoj de E. K. donis al ni tre valoran pergamenon vendotan por la profito de E. K. Tiuj, kiuj estas interesataj pri l' afero, bonvolos peti informojn de la Direktoro.*

kiu estas 7.106.452, la 100.000 katolikojn de Porto-Rico kaj la 35.000 katolikojn de l' Sandwich insuloj, la katolika loĝantaro tuta, kiu vivas sub la Usona standardo estas 220.018.898.

En tiu lando estas 15.665 katolikaj pastroj; 11.496 estas sekularaj pastroj kaj 4.068 estas religiuloj.

La tuta nombro de l' preĝejoj katolikaj en Usono estas 12.513. Ekzistas 4.443 komunumaj lernejoj, kun mez-nombra ĉeesto de 1.113.906.

La 4 plej maljunaj prelatoj amerikanaj estas: Kardinalo Gibbons, de Baltimore; Episkopo Mc Closkey, de Louisville; Episkopo Mc Quade, de Rochester, kaj Episkopo Hogan, de Kensas City, kiuj estis ordenigitaj en 1868.

ANGLUJO. — Markizo de Queensberry anoncas en revuo *The Tablet* sian konvertiĝon al Katolikismo, kiu okazis la 4-an de aprilo. Li ricevis konfirmacion de M-ro Bourne, ĉefepiskopo de Westminster.

PROPAGANDA KRONIK

Inter la Katolikoj.

Ni insiste petas niajn amikojn, he ili bonvolu sendi al ni informojn pri sia propagando, por tiu rubriko. Ni ricevis, de post la lasta N-o, nur malmulte da materialo. Ĉu niaj amikoj ne plu propagandas?

Belga. — « La propagando progresas pli kaj pli en Belgujo. Mi fondis la 27-an de aprilo novan klubon en Tungra nomitan *Idoj de Ambrorikso* kun la devizo « ĉiam klopodi ». La prezidanto estas Johano Loumet, la sekretario Jozefo Walmach, de longa tempo esperantigita en la seminario de sankta Trudo, dank' al pastro Decœne. Ni havas en ĝi S-on Pastron Kerkhap, filozofia profesoro. La titolo de la klubo, kies mi estas estro, estas *Juna Espero* kaj la devizo « Antaŭen kaj ĉiam ». Ni

estas 30. En la Tungra Klubo estas 25 anoj. F. MATEO. »

Hispana. — Nia amiko, P-o Guinart, sendita en urbeto Utiel pro malsano, ne restis sen zelo. Li ĵus fondis tie grupon, al kiu ni sendas plej koran saluton. Prezidanto S-o Jos. Plannells. Sekretario S-o Jos Chocomeli. Kasisto P-o Guinart. La konsulo de Utiel estas S-o Ernesto Artiz, *Arrabal del Rio*, Utiel (Valencia).

Franca. — « Tra via revuo vi petas detalojn pri propagando. Unue mi ĉiam surmetas la verdan stelon, esperante ke ĝi min helpos por la celo, kiun mi deziras atingi. Vojaĝante, mi ĉiam kunportas kun mi E. K.; mi provas atentigi la personojn, montrante la titolon, ĉar kutime (mi ne scias por kio, kredeble por scii la opinion) oni ŝatas koni la gazeton, kiun legas tiu aŭ alia vojaĝanto. Bedaŭrinde sur niaj fervojetoj oni malofte renkontas samideanojn, sed laste ni interkonatiĝis kun Laval'aj Esperantistoj. Tuj mi parolis pri E. K. kaj fervore propagandis, sed mi ne pensas, ke mi sukcesis, ĉar iom juna estas tiu kunbatalanto, tamen li estas tre entuziasmata por Esperanto, li promesis ke li abonos al via revuo. SPERANZA. »

L'Avenir Bourguignon (majo 5-a) en sia kroniko analizas E. K. aprila kaj speciale rimarkigas la artikolon pri *Volksverein Holanda*. La redaktoro « Leganto » esperas publikigi tradukon de ĝi.

La Croix (aprilo 9-a) anoncis per favoraj vortoj niajn *Preĝaro* kaj *Hebrea Kalendaro*. Se ni povus fari reklamon en tiu potenca ĵurnalo katolika, ni estas certaj, ke E. K. rikoltus multajn abonantojn kaj per tiu reklamo multe disvastigus Esperanton inter katolikoj. Sed... mankas al ni la mono necesa. Ni bezonus, kiel provo, 50 fr. — *Rekomendata* al la malavereco de niaj legantoj riĉaj.

Holanda. — *De Kristelijke Actie* (April. 11) publikigis tradukon de l' amuza novelo de Jean des Tourelles *Mi intermiksas*.

La semado de nia amiko « Holandano » certe ne estos perdata. Sed li bezonus helpon. Katolikaj Esperant-

istoj estas ankoraŭ tre malmultaj en Nederlando.

Portugala, — La senlaca propagandisto S-o Cefeç, revenante de Insulo Madero, haltis en Lisboa, kaj, kvankam ne konante la Portugalan lingvon, sukcesis krei kursojn pri Esperanto kaj eĉ fari paroladojn en Esperanto! Portugalujo estas, kiel Holando, ankoraŭ tre malmulte esperantigita. Tamen nia Delegato, D-o Malato, tre aktive propagandas kaj jam varbis plurajn abonantojn al E. K.

L. MILHO.

PETRA MONERO

Kredeble, niaj legantoj ne atentis pri la subskribo, kiun E. K. malfermis en aprila N-ro (p. 210) por la *Petra Monero* okaze de l' Jubileo de nia Sankta Patro Pio X-a. Ni varme rediras nian alvokon, kiu certe estos respondata. La Esperantistaj katolikoj ne devas esti la sola korporacio katolika, kiu ne sendus donaceton al Papo, en tiu ĉi jaro.

Em. PELTIER.

Subskriboj.

Espero Katolika.

25 fr.

Speranza.

1 fr.

KATOLIK-ESPERANTISTAJ SOCIETOJ

PASTRA ESPERANTISTA FRATARO (P. E. F.)

Francaj Membroj

Angers (M.-et-L.) : M-o Pasquier, rektoro de Katolika Univer-
sitato.

Autun (S.-et-L.) : P-o Al. Veronnet, Institution St-Lazare.

Clichy-la-Garenne (Seine) Abato Martin, 128, Boulevard
National.

Epinay-sur-Seine (Seine) : P-o E. Bouquerel, Villa St-Joseph
10, rue Belmont.

Montivilliers (S.-Inf.) : P-o J. Demeilliers, vikario.

Fremdaj Pastroj

- P-o Frohns, *Warstade*, apud Stade, Germanl.
 P-o Em. Debom, The Presbytery, *Shanklin*, Isle of Wight, Angl.
 P-o Schips, *Schloff-Nereisheim*, post Nereshem, Würtemberg, Germanl.
 P-o W. Owen, Oscott College, *Birmingham*, Angl.
 P-o I.-C. Rust, The Vicarage, *Soham* (Cambs), Angl.
 P-o Maheu, presejo de l' Misiono, *Quinham*. Annam.
 P-o J. Rajczy-Szalatanak, *Baranyamegye*, Aŭstri-Hungarl.
 P-o Ant. Müller, *Prosek [u Vyzocam* (Praha), Aŭstr.-Hungarl.
 P-o Myslish, Berick Misselboch, Post Gnadendorf, *Pyrha*, N.O. Aŭstr.
 P-o A. Krajewski, *Zator* (Galicie), Aŭstr.
 P-o Serégiers, Collège Notre-Dame, Avenue des Arts, *Anvers*, Belgl.
 P-o J.-M. Mergeay, *Finneveaux*, par Mesnil-St-Blaise, Belg.
 P-o E. Servais, *Fosses*, Belg.
 P-o Honinck, *Laplante* (Namur), Belg.
 M-o Van den Branden de Reeth, episkopo de Tyr, *Malines*, Belg.
 P-o Lambo, Petit Séminaire, *Malines*, Belg.
 P-o Schurmanns, Béguinage, *Malines* (Anvers), Belg.
 P-o Sallets, vikario de *Oostmalle* (Anvers), Belg.
 P-o M. Thewis, kapelpastro al St-Germain, *Pépinster*, Belg.
 P-o Decoene, *St-Trond*, Belg.
 Frato Ludoviko, Institut de *St-Trond*, Belg.
 P-o Jean Joseph, rue du Prince, *Verviers*, Belg.
 Abato Cauwenberg, *Westmalle* (Anvers), Belg.
 Abato Van Genechten, vikario, *Westmalle* (Anvers), Belg.
 Frato Isidore, Institut royal des Aveugles, *Woluwe*, Belg.
 P-o Oevelen, *Zoersel* (Oostmalle), Belg.
 Frato H. Respectat, Noviciat Mont de la Salle, *Maisonneuve, Montréal*, Kanada.
 Rev. C. Hermano, linea 6o, *Vedado-Habana*, Cuba.
 P-o Salvador Vital, vikario de Ripollet, *Barcelone*, Hispanl.
 P-o J.-G. Nebril, Escolapio, *Bilbao*, Hispanl.
 Rev. Tzequill Villaraja, Universitato do *Cervera* (Sceride), Hispanl.
 P-o M. Navarro, calle del Pingcerver, 19, *Murcia*, Hispanl.
 P-o A. Dombrovski, *Kovno*, Rusl.
 P-o F. Poško, Arsenalnaja, 8, *St-Petersburg*, Rusl.

- P-o A. Ribalta, Escoles Pies, *Sabadell*, Hispanl.
 P-o Henriko I. Eilo, S. J. Sta Luis-Universitato, *St-Louis*,
 Usono.
 P-o Parker, Kilmyshall, *Ferns* (Co. Wexford), Irlando.
 P-o J. Meazzini, *Arezzo-Ortignano*, Itall.
 P-o J. Monai, *Codroipo* (Udine), Ital.
 P-o J. Caseti, *Milano p. Lambrate*, Itall.
 P-o J. Menini, kapelpastro en Kastions de Zappola, *Pordenone*
 P-o J. Gorenszach, Cappeleno, *S. Leonardo degli Slavi*
 (Udine), Itall.
 P-o E. Schmitz, rua do Seminario, 26, *Funchall*, insulo Madeira.
 P-o M.-D. Rayon, apartado 104 bis, *Mexico* (D. F.), Meksikl.
 P-o M.-J. Fernandes, *Arcos de Valdeveze*, Portugall.

ABELO ESPERANTISTA

- S-o Feliks Napski, *Zgierz*, Piotrk. gub., Rusl.-Pol. — Libroj.
 S-o Luciano Graziani, *Fontanafredda de Pordenone*, (Udine),
 Ital. — Oliva oleo.
 S-o Zanon Giuseppe, *Villadelconte* (Padova), Itall. — Kun-
 metitaj lakto-ipofofitoj.
 S-o A. Dubar, 30, rue du Bois, *Roubaix* (Nord), Franc.
 S-o Louis Crosse, 83, Baker Street, *London-W.*, Angl.
Korekta adreso: Firmo Malone brothers, 68-69-70, Great Strand
 Street, *Dublin*, Irlando. — Botpoluro.

SOCIETO KATOLIKA INTERNACIA (S. K. I.)

- S-o Rawicki, seminario katolika, *Wloclawek*, Rusl.-Pol.
 F-ino L. Petit, 23, rue du Chemin de fer, *Vitry-sur-Seine* (Seine),
 Franc.
 S-o Juliano Kolomyjski, seminario de *Sejny*, Suwalska gub.,
 Pol.-Rusl.
 S-o Ludoviko, *St-Trond*, Belg.
 S-o A. Vigneron, oficisto, 1, rue du Champ-de-Mars, *Paris*,
 Francl.
 S-o V.-J. Baras, instruisto pensiula, en *Bosson - Vesbomont*,
 Belg.
 D-o G. Busuttill, *Misido*, Malta.
 S-o Louis Rigoir, licenciato en literaturo, fervoja oficisto, 26,
 rue du Progrès, *Marseille*, Francl.

KATOLIKAJ KUNVENOJ EN DRESDEN

Ni plezure anoncas al niaj legantoj, ke Kanoniko Pichot, parokestro de *Ste-Dévôte*, Monaco, tre lerta kaj fervora Esperantisto, konsentis esti Prezidanto de niaj kunvenoj dum la Kvara. Li kutimas ĉeesti kongresojn (li estas vic-prezidanto de Pacifista Societo), kaj certe li plej bone organizos ĉion. La Vic-Prezidanto estas P-o A. Richardson, Institut St-Louis, Bruxelles, kiu samtempe akceptis la rolon de sekretario de *Pastra Esperantista Frataro*. P-o Derroite, 108, avenue Victor-Hugo, Paris, estas sekretario de S.K.I. P-o Frohns, en *Warstade*, Germanujo, konsentis zorgi pri la Diservo.

Ni petas niajn legantojn, ke ili bonvolu relegi la demandojn presitajn en E. K. aprila (p. 222-223), kaj sendu plej multajn kaj praktikajn respondojn *rekte* al la sekretarioj. — Pri *Abelo Esperantista* oni povas sendi la informojn, provizore, al la Direktoro de E. K.

LETERO DE P-o RICHARDSON

Al Redaktoro de E. K.

Kara Amiko. Mi kuraĝas diri, ke mi estas la eĥo de la preskaŭ tuteco de viaj abonantoj, kiam mi esprimas miajn ĝojon pri via klara decido : forlasi definitive en nia kara E. K. ĉiujn lingvajn diskutojn kaj, laŭ viaj propraj vortoj, « fariĝi E. K. revuo tute specialista », nome sindonata al la servo de nia sankta religio *per* Esperanto.

Ĉar vi opiniis devi permesi al S-o Lime « diri sincere sian plenan opinion pri reformoj », vi ne rifuzos al mi la rajton diri la opinion de la granda plimulto de la Esperantistaro katolika pri la sama demando.

1) Ni estas konvinkataj, laŭ la vortoj de S-oj Moch kaj de Saussure, ke reguloj pri derivado de Ido ne estas ĉiuj pravaj. Laŭ la opinio de nia klera amiko Ĉefeĉ, li tro limigas la signifon de radikoj.

2) Ni pensas, ke anstataŭi per novaj radikoj *multegajn*

radikojn de la Zamenhofa vortaro ekvalus tute ŝanĝi nian lingvon. Estas neniel necesa, male, malutila. Cetere la ekzemplojn, kiujn ni jam vidis, de « pli internaciaj » radikoj pli starigas nin je nia opinio.

3) Ni *tutkore* akceptis la belegan cirkuleron de nia kara Majstro, verkon ne de pedanto, sed de genio.

4) Ni opinias, tiel kiel la Majstro, ke ĉe lingvo kiu ne plu estas projekto, sed lingvo *vivanta*, ŝanĝoj per dekreto de ia ajn Delegacio estas absolute ne eblaj. Evolucio devos *necese* fariĝi iom post iom. Neniu *iam* dubis, ke tiu evolucio devos esti kontrolata de bona L. K.

5) Ni ĉiuj konsentas, kun la Majstro, kiu absolute kaj definitive rompis kun la eks-delegacio. Ni neniel deziras rehavi iajn rilatojn kun viroj, kies la celo estas nun tute klara anstataŭi nian lingvon per ilia novlingvo.

Ni dankas vin, kara Redaktoro, pro via saĝa decido, kaj precize *pro tio*, ni penados ankoraŭ pli forte por propagandi vian interesan kaj utilan ĵurnalon por la plej granda gloro de Dio.

Tute via,

Austin RICHARDSON.

Sekretario de la *Pastra Esperantista Frataro*.

Por montri plenan senpartiecon kaj pro la amikeco, kiu ligas nin kun P-o Richardson, ni volonte publikigis la supran leteron. Sed ni insiste petegas niajn amikojn, ke ili *ne plu sendu* al ni leterojn pri tiu temo. Ni ne povos enpresi ilin. Bedaŭrinde la *lingva diskutado* fariĝis inter la Esperantistoj *persona disputado*. Ni ne volas partopreni polemikojn, kiuj baldaŭ fariĝos skandalo, tiel por Esperantistoj, kiel por ne-Esperantistoj.

La DIREKTORO.

PROMENADO TRA GAZETOJ

Naciaj Katolikaj.

The American Catholic Quaterly Review. Jan. 1908. Tiu grandformata revuo (17 cm. × 25), 200-paĝa sur belega papero, aperas ĉiu tria monato, kiel montras la

titolo. Ĝi estas unu el la plej gravaj Amerikaj gazetoj katolikaj. La enhavo de tiu numero estas plej interesanta : Pledo (advokata parolado) por Itala pronunco de Latino : Rev. H. T. Henry. Skotlanda apostolo R. F. O'Connor. La filozofio de Newmann Rev. M. J. Ryan. La Encikliko pri Modernismo Rev. J. Murphy. Eklezio kaj eksperimentala metodo James Walsh. P. D. M. D.

Tiu lasta artikolo, tre dokumentita, — kiel ĉiuj en tiu gazeto — respondas al tiuj, kiuj laŭte kriadas, ke Eklezio estas kontraŭ scienco kaj sciencaj metodoj de serĉado.

Revue du Clergé Français (Revuo de Franca Pastraro. — France). April. 1. Plej notindaj artikoloj Biblia Ekzegezo kaj Eklezio F. Dubois; montras, ke « kritika kaj scienca ekzegezo estas ĉiam ebla malgraŭ la postuloj de Eklezio »; Biblia kroniko L. Venard, recenzas plej novajn kaj gravajn librojn publikigitajn en lingvoj Franca, Germana, Angla; Sociala movado Ch. Calippe; Konsultoj kaj informoj; Libera Tribuno kaj Dokumentoj.

April. 15. — Disvolvado de Dogmoj : J. Bricout, direktoro de l' gazeto. Nia amiko, fervora Esperantisto, rimarkinde klarigis tion, kion oni devas kompreni per « disvolvado de dogmoj ». Jen la tri demandoj responditaj de li : 1. Ĉu estas legitima paroli pri disvolvado de dogmoj ; 2. Kio ĝi estas ? 3. Kiaj estas ĝiaj « faktoroj » ? — Kiamaniere s. Augustino kaj Bossuet starigas aŭtoritaton de Eklezio J. Turmel; Filozofia kroniko Eug. Lenoble.

Franc-Maconnerie démasquée (Framasonaro senmaskigita) Apr. 10. Enhavas plenan raporton pri la ĝenerala kunveno de l' *Asocio Antimasonara*. Rimarkinda parolado de S-o Flourens, eks-ministro de Fremdaj Aferoj, pri l' influo framasona sur la ekstera kaj kolonia politiko franca.

Loko mankas al ni por analizi aliajn gazetojn ricevitajn, nome *L'Action Franciscaine*, *Annales Apostoliques des PP. du St-Esprit*, *Annales de N.-D. de Lourdes*, *Le Coin de Terre et le Foyer*, *Rivista del Sacerdote Apostolico*.

C. DE LA ROCHE.

Ni tie ĉi rediras nian deziron havi seriozajn kaj lertajn korespondantojn, por sendi al ni analizon de katolikaj nefrancaj gazetoj, kiel *The Tablet*, *The Month* en Anglujo, kc. La kandidatoj bonvolu skribi al la Direktoro de E. K.

Ni ankaŭ malfermos rubrikon por konigi la plej rimarkindajn katolikajn librojn, kiuj estas publikigataj en la mondo. Generale, niaj Korespondantoj por gazetoj trovos informojn en la revuoj.

La DIREKTORO.

ESPERANTA BIBLIOGRAFIO

Centra Oficejo. — *L'Esperanto et les institutions publiques*. Aro da dokumentoj rilate al la disvastigo de Esperanto. Dokumentoj en franca lingvo 1 fr. 25. — *Esperantista Dokumentaro Esperantista Societaro*, 4-a eldono, korektita ĝis la 31-a de dec. 1907 1 fr. 50. — *Esperantista Dokumentaro. Oficiala parto : Tria Universala Kongreso de Esperanto* (Cambridge) : 1 fr. 50.

Hachette kaj Ko. — *Dizionario Italiano-Esperanto*, de G. Meazzini. 404 paĝ. Prezo : 2 fr. 50. — *Libro de l'Humoraĵo*, de Paul de Lengyel. Dua eldono. — *Provo de marista terminaro*, verkita de kelkaj kompetentuloj sub la direkto de S. Rollet de l'Isle. Kartonumita. 75 paĝ.

Presa Esperantista Societo. — *Du slavaj rakontoj*, de M. Gorkij kaj I. Vazov. 40 paĝ. 60 centimoj. — *La sendependa Ordeno de la Bontemplanoj*, de Dr Legrain. Trad. M. Gautrot. Sociala solvo de l'alkoholisma problemo. 24 paĝ. 40 centim. — *Por Esperanto*, de P. Nylen, Rollet de l'Isle, A. Frenkel, N. Kabanov. 23 p. 50 centim. — *Por arbitracio*. Andrew Carnegie. Antaŭparolo de d'Estournelles de Constant. Trad. W. Padfield kaj H. Maresquelle. 50 centim. — *Estonta milito*, laŭ la instruoj de Johano de Bloch. Trad. F.ino Cécile Royer, F. Schuck kaj Alesiano. Prezo 1 fr. 50. — *Formulo pri malarmo*, de Otto Umfrid, Trad. P. Christaller. Pr. 25 centim. —

Malnovaj paĝoj el Lingvo Internacia. Unua serio, 1896. Prezo 1 fr. 25. — *Grand Dictionnaire Français-Esperanto*. De vorto bas ĝis bibliographique.

Diversaj. — *Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj*, 25 p. eldonita de « Esperanto », 8, rue Bovy-Lysberg, Genève — *La aerkuracloko Weisser-Hirsch*, apud Dresden. Esperanta Vilaĝo 1908. 52 p. Aĉetela ĉe la *Kvaro*. — *Klic Esperanto* (ŝlosilo por Bohemoj, kaj *Neutralni jazik mezinarotni Esperanto* (Tuto por Bohemoj), ĉe « Internacia Propagandejo Esperantista », Merton Abbey, London, S.-W. — *Manila, the pearl of the Orient*. Gvidlibro Angle redaktita, ilustrita. « The Manila Merchant's Association », Philippine Islands.

Evolucio libera aŭ Akademio. A. Michaux. Librejo de Esperanto, 15, rue Montmartre, Paris. 23 p. — *Les vrais principes de la langue auxiliaire*. Etude pratique dédiée à tous, mais surtout aux Esperantistes. France verkita de Ido. 32 paĝ. Pr.: 50 centim. Imprimerie Chaix, 11, Bd St-Michel, Paris.

Progreso, oficiala organo de la « Delegitaro por adopto de Lingvo helpanta internaciona e de sa Komitato, konsakrata ad la propagado, libera diskutado e konstanta perfektigado de la *Lingvo internaciona*. N^o 1 (marto) kaj 2 (aprilo). Librejo Ch. Delagrave, 15, rue Soufflot, Paris.

Roma Esperantisto, nova gazeto de l' Roma grupo « Imperiosa Civitas », direktata de Monsinjoro Luigi Giambene, la afabla *protektanto* de E. K. Ni plej kore salutas tiun novan kunfraton kaj deziras al ĝi plej vastan sukceson.

Muziko. — *Kuŝas somero*, poezio de E. de Kanalosŝi-Lefler. Muziko de F. de Ménil. — *Mi aŭdas vin*, poezio de Leono Zamenhof. Muziko de F. de Ménil. Ambaŭ ĉe Hachette. Ciu 1 fr. — *Esperanto*, kvarvoĉa kanteto. Vortoj de James Blaikie. Muziko de R. H. Sexton. Brita Esperanta Asocio, 133, High Holborn, London, W. C. Prezo 3 d. (12 spesdekoj).

'SAKOJ

Sub la redakcio de S-o AL. WAGNER, STANISLAU, 2. Aŭstrujo.

Ludo XIX

Siciliana defendo. — Unua el nia koresponda ŝakturniro.

Blanko

Nigro

D-o G. Mailard

S-o A. Nissen

1. S — 4R
 ĉi certan defendon eltrovis 1585 la siciliana abato Giulio Cesare Polerio.

2. C — 3KD

C — 3KD

3. C — 3KR

S — 3CR

4. S — 4D

S × S

5. C × S

K — 2C

6. K — 3R

C — 3KR

7. K — 2R

o — o

8. D — 2D

S — 3D

9. T — 1D

C — 5CR

10. K × C

K × K

11. Ĉ × Ĉ

S × C

12. S — 3K

K — 2D

13. S — 4TR

D — 4T

14. S — 5TR

K × Ĉ

15. S × K

D × S7T

16. R — 2K

D — 3R

17. S × S

SK × S

18. T — 6T

T — 2K

19. TD — 1TR

S — 4K

20. R — 1C

T — 1Ĉ

21. D — 1R

D — 7T


22. D — 2D

T — 7Ĉ

Problemo XX-a

Komponis Rengau.

Nigro : 3 pecoj.



Blanko : 3 pecoj.

Blanko komencas kaj gajnas plej malfrue en 6 iroj.

23. T × S (ŝ)

S × T

24. T — 4T

24. T — 4T

T × SK7

25. S × K

25. K — 4D

S × K

26. R — 2K

26. D — 6T

T × S (ŝ)

27. S × S

27. R — 1T

T — 7T (ŝ)

28. T — 6T

28. T × T

D × T (ŝ)

29. TD — 1TR

29. R × D

T — 2T

30. R — 1C

30. D × T (ŝ)

R × D

31. D — 1R

31. S × S

S — 4T

ĉesas.

Kongreso.

S-o Erwin Heydweiller, Dresden A, Rubenerstr. 13 D) klopodas pri la ŝakfrko por la kongresontoj, kaj mi esperas doni pli detalan raporton pri liaj laboroj en venonta numero. Kredeble la Dresdena ŝak-unuiĝo hepos la kongresanojn tiam niere, ke ili povu ofte kunludi. Intertempe mi petas ke ĉiuj, kiuj intencas partopreni en la ŝakludado, bonvole sendu al mi la nomon kaj adreson, kiel eble plej frue.

John ELLIS.

Sekretario de la Societo de Esperantistaj Ŝakludantoj.

Le Directeur-Gérant, EM. PELTIER.

Presejo de *Espero Katolika*. Sainte-Radegonde (I.-et-L.), FRANCE

REKLAMOJ

(Vidu tarifon sur dua paĝo de l' horilo.)

Faukner-Adresaro de esper. korespondantoj, tre bone aranĝita, aperados de julio. Prezo (afrankite) kun enpresado de adreso 50 hel. 10 ekz. 4,50 K, 50 ekz. 21 K. — Esperanto-Oficejo de K. E. Krupka en Hradec Králové (Bohemujo). — Sendu tuj vian adreson kun 0 fr. 55.

L'ŒUVRE DE LOURDES

FRANCA VERKO DE D-ro BOISSARIES

— ILLUSTRITA PER 60 SIMILIGRAVUROJ —

Granda volumo in-8; 400 paĝoj. Prezo: 3 fr. 50

Rimarkinda libro, publikigata okaze de l' 50-a dat-reveno de l' Aparacioj de Lourdes.

Aĉetebla ĉe *Espero Katolika*. Sendu monon kun la mendo.

MUZIKAĴOJ DE S-ino JOSÉE GUIVY

Ho, Mia Kor', poezio de D-ro Zamenhof	1 fr.
En Songo, poezio de D-ro Zamenhof.	1 fr. 60
Birdoj, forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i>	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine.	1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrowski	1 fr. 25

COURS ÉLÉMENTAIRE D'ESPERANTO

Publié dans *Les Langues Vivantes*

PAR

Em. PELTIER, Dir. de E. K.

GRAMMAIRE — EXERCICES — PHRASEOLOGIE — CONVERSATIONS

Prezo 0 fr. 30; (afrankite 0 fr. 35)

MEDALO DE LA 50-a DATREVENO

DE L' APARACIOJ EN LOURDES

dirita *Medalo de la Dankeco*.

Du modeloj: Nikelo argentumita, 2 fr.; nikelo argentumita kaj orumita, 3 fr. 75. — Poŝta rekomendo, plie 0 fr. 10 en Franc., 0 fr. 25 ekster Franc.

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA

1-a SERIO: 1-a j.; — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro. 'Ciu jaro 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.). Duono de la 3-a jaro (gis marto 1906) 1 fr. — (La kolekto gis marto 1906: 5 fr. afrankite).

2-a SERIO: Duono de la 3-a jaro (de marto 1906 gis oktobro 1906) — 4-a jaro (de oktobro 1906 gis oktobro 1907): 7 fr. 50 (En Franc. 6 fr.)

KATALOGO DE ESPERO KATOLIKA

- Katolika Preĝaro**, 1-a volumo, 180 p., kun *Imprimatur* de M-ro Renou, Cefepiskopo de Tours 2 fr. 50
- Kato kun botoj**, luksa eldono, 6 ilustraĵoj. 0 fr. 25
- Cindrulino**, el sama kolekto. 6 ilustr. 0 fr. 25
- Patro Nia**, ĥoro por soprano, aldo, tenoro kaj baso, dediĉita al la *Tria Kongreso* kaj kantita dum la meso por Katolikoj en Cambridge. Teksto kaj kompono de Johano GOTHARDC (154-a verko); 6 paĝoj da muziko. Aĉetebla pogrande nur ĉe *Espero Katolika*. Prezo . 60 Sd., 1 M. 25 1 fr. 50
- La Katolikaj Esperantistoj ĉe la 2-a Kongreso** de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto kun la prediko de P-o Em. PELTIER 0 fr. 15
- Katolikaj Kunvenoj dum la Tria Kongreso** en Cambridge (1907) 0 fr. 25
- Pri unu speco de kurbaj linioj**, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesoro DOMBROVSKI (2-a eldono). 0 fr. 65
- Pri novaj trigonometriaj sistemoj**. Originale verkis Prof. DOMBROVSKI 1 fr. 80
- Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe *E. K.*
- Per Telefono**, sceneto de Jacques-Freneuze; kun permeso de l' aŭtoro tradukis José Guivy. 0 fr. 15
- Imitado de Jesu-Kristo**, 1-a libro; tradukis Paul DESCHAMPS. 100 p. 1 fr. »
- Katolikaj Kunvenoj dum la Kvara Kongreso** en Dresden (1908) 0 fr. 25
- Une Révolution Sociale**, une langue internationale permettant l'intercompréhension avec tous les peuples, par Em. PELTIER 0 fr. 10
-

MODERNA BIBLIOTEKO

Serio : BIBLIAJ STUDIOJ

1. **Hebrea Kalendaro**, originale verkita de Pastro Jakobo Bianchini (Italo), kun *Imprimatur* de M-ro Renou, Cefepiskopo de Tours 0 fr. 20

Serio SOCIALAJ DEMANDOJ :

NOVAJ VERKOJ

1. **Internaciismo kaj Pacifismo**, el *L'Action Franciscaine* trad. ARY-BOURG. 0 fr. 25
2. **Ruĝuloj, kion ili volas**, de Hilaire de Barenton, trad. Paul DESCHAMPS 0 fr. 25
3. **Flavuloj, kion ili volas**, de Hilaire de Barenton, trad. Paul DESCHAMPS 0 fr. 25

Serio APOLOGETIKO

1. **Lando de Mirakloj**, el *L'Œuvre de Lourdes*, de D-ro Boissaries, trad. EM. PELTIER 0 fr. 50

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revo de Franca Pastraro*). — Redaktoro : Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio : Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono, 3 fr. (En Francl. 20 fr.). 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

L'ACTION FRANCISCANNE (*Franciskana Agado*). — Monata organo de Franciskanaj Asocioj. Bonega Franca revuo 32-paĝa. Pritraktas socialajn demandojn. — Abono jara : 7 fr. (6 fr. en Francl.). Admistr. 117, Bd Raspail, Paris. - 6^c

LES LANGUES VIVANTES (*La Vivaj Lingvoj*), Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Eldonita de la firmo Bloud, 4, rue Madame, Paris, ĉe kiu oni devas peti specimenon.

Abonoj :	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Francl,	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Ekster Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

LA REVUO. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D-o ZAMENHOF. — Ce Hachette kaj Ko, Paris. — Jare, Francujo Fr. 6; ceteraj landoj Fr. 7 fr.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, 48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto. Literatura aldono, 16 paĝoj. Jara abono : 7 fr. 50 (3 sm.). Administracio Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, monata organo de la *Societo por la Paco*. — Abono, 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj. S-o Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine, Francujo.

TRA LA MONDO, tutmonda multilustrita revuo esperanta, — Nuntempaĵoj; artoj, literaturo, scienco; komerco; industrio; militistaro, maristaro; teatro, sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono; ludoj; konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr.; kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

ANNALES APOSTOLIQUES DES PP. DU SAINT-ESPRIT (*Analoj Apostolaj de PP. de S-a Spirito*), 30, rue Lhomond, Paris. Jare 3 fr. 50, en Francl. 3 fr.

GAZETTE PÉRIODIQUE DE LA BOURSE DE PARIS, 3, rue d'Amboise. — Serioza grand-formata gazeto financa, France redaktata. — Abonoj : Francl. 3 fr.; ekster Francl. 6 fr.

FRANCA-BRITA EKSPOZICIO. — Pensio por Gesinjoroj — Hejmaj komfortaĵoj. — Bano. — Moderaj prezoj. — Oni parolas Esperante, France, Angle. — S-ino O'Connor, Esperanto House. 17, St-Stephens Sqr. Bayswater, London. I

MODERN-JOURNAL

sĉmajna, sporta, literatura, teatra; en Franca lingvo.

Petas korespondantojn, redaktorojn en ĉiuj urboj; Estas organo de l' grava Sociĉto de kolektistoj: *L'Amicale Internationale Echangiste*.

Serioza konkurso 50 fr. por unu « Soneto ».

Modern-Journal presas la novelojn, rakontojn, kc. de siaj legantoj.

PROPAGANDA ABONO. — Detranĉante tiun anoncon: 3 fr. jare, anstataŭ 6 fr.; — 2' fr. por 6 monat. anstataŭ 3 fr. — Directeur de *Modern-Journal*, 46, rue du Nord, Paris-18.



KATŬ KUN BOTOJ

Legolibro por komencantoj
Granda Rabato —
— *Prezo nur 0 fr. 25*

La fil'o de muelist'o obe'is si'a'n amik'o'n kat'o'n, sen-vestiĝ'is kaj saltis en akv'o'n. La ruz'a kat'o for-kuris kun li'a'j vest'o'j por ili'n kaŝ'i sub larg'a ŝton'o.

Dum'e la reĝ'o veturis tie'n kun sia'j filin'o'j. Kat'o ek-al-vok'is laŭte: « Help'o'n! Help'o'n! aŭ mia maestr'o markiz'o de Karabas dron'os! » La reĝ'o tuj halt-ig'is si'a'n vetur-il'o'n kaj demand'is kia est'is afer'o. La kat'o respond'is, ke dum li'a maestr'o ban-ig'is, ŝtel-ist'o'j for-pren'is lia'jn

CINDRULINO (el sam'a kolekto). —
Granda rabato: *Prezo nur 0 fr. 25*